

Kiam Valdo survoje al la lernejo falas en flakon, io tuteksterordinara okazas al li. Ĉion li trovos aliigita : li ne rekonas plu sian propran urbon, li ne povas plu legi aŭ skribi, lia tuta mondo ŝanĝiĝis en spegulmondon. Valdo grave konfuziĝos pro tio. Ĉu lia patrino ekzemple vere estus lia reala patrino? Ĉu spegulo-patrino?

Sekvas streĉigaj tagoj por Valdo, sed feliĉe ĉio bonfiniĝos...

L A S P E G U L F L A K O

De Spegulflak 1987

Sylvia VANDEN HEEDE

Por Tamara.

1987.

Kovrilskizo kaj desegnaĵoj de André Sollie.

*En la originala nederlanda lingvo verkis Sylvia Vanden Heede;
en Esperanton tradukis ŝia patro, Walter Vanden Heede.*

1. La ruĝaj botoj

Valdo estis ricevinta novajn botojn. Ruĝajn botojn, kiujn per blankaj laĉoj li povis laĉi supre, tial ke liaj piedoj eĉ en pluvego ne malsekiĝus. Valdo fieris pri siaj botoj.

"Panjo, ĉu mi rajtus jam foriri al la lernejo?" iufoje tagmanĝinte li demandis. Lia patrino demetis sian libron kaj ekrigardis lin kuntirante la brovojn. "Nun jam al la lernejo? Sed tute ne urĝas!" ŝi grumletis. "Kial ci volas tiel frue foriri?" Valdo ekruĝiĝis. Verdire maldecas al grandaj knaboj piedfrapetado en flakoj, sed ... Li spionregardetis eksteren. Estis pluvinta kaj la flakoj alloge brilis en la aŭtuna sunado. "Nenial" li replikis malafable, "Ĉar plaĉas al mi". Lia patrino estis rimarkinta lin avide rigardantan tra la fenestro kaj poste al liaj belaj novaj botoj. Ĝemegon eliginte, ŝi tamen afable ridetante respondis : "Ci vere estos multe tro frue, mia filo, sed se ci tiel deziras jam foriri, mi konsentas."

Valdo gaje ekridis, kaptis sian jakon kaj enŝovis la piedojn en siajn belajn ruĝajn botojn. Li surmetis sian ĉapon, enigis siajn aĵetojn en sian librosakon, malfermis la pordon kaj jen ekstereniĝis. Tiel komenciĝis lia aventuro.

Valdo estis nur ordinara knabo. Li havis brunan hararon - "porkhararon", laŭdire de siaj fratinetoj - kaj du grandajn orelojn ĉe kiuj lia patrino lin kaptas kiam li montriĝis malbonkondata. Liaj okuloj streĉiĝis iom oblikve kiel de Ĉino, sed ili havis pluvĉielan koloron. Li havis grandan rozan buŝon kiu ektemetis kiam li maltrankviliĝis aŭ ĉagreniĝis.

Nenio plue okulfrapigis Valdon. Li estis nek eksterordinare afabla nek eksterordinare ĝena. Li ne multe kuraĝis, tamen li ne facile ektimiĝis. En la lernejo li montriĝis nek la plej nek la malplej inteligenta. Li globetludis ne pli bone aŭ malbone ol la plimulto da knaboj kaj en gimnastiko li ĉiam akiris sep. Kaj koncerne manĝaĵojn, li ŝategis ĉokoladon kaj, evidente, malŝategis florbrasikojn. Unuvorte, Valdo estis tutordinara.

Tamen io tuteksterordinara okazis al Valdo survoje al le lernejo tiun posttagmezon, pro kio li ĉesis dum kelka tempo esti ordinara knabo. Tion kaŭzis la flako.

Ĝi estis granda flako. Valdo povis vidi en ĝi sin mem : trememan, vibrantan vizaĝon kiu sulketiĝis ĉe ĉiu ventspireto. Li povis ankaŭ vidi en ĝi preterflosi la nubojn. Volumenajn grizajn nubojn sub vasta griza ĉielo. Malantaŭ lia kapo sin etendis la senfoliaj arboj. Kiam tremetis lia vizaĝo, same faris la arboj. Kiam sulketiĝis la arboj, same fariĝis lia vizaĝo. Komike tio estis kaj Valdo ekridis. Haste ĉirkaŭrigardante li rimarkis nenion kiu povus lin vidi. Tiam li enmetis singarde la pintojn de siaj ruĝaj botoj en la akvon. Malgrandaj ondetoj forfuĝis kaj kunpuŝiĝadis unu kontraŭ la alia. Valdo ekmovis la piedfingrojn kaj la ondetoj ekruliĝis pli rapide, transkapigadis unu la alian, kaj malaperis. La arboj tremis kaj skuiĝis, kramftordiĝis kaj kurbiĝis, svingiĝis kaj ŝanceliĝis. La ruĝaj botoj suprenfrapadis la akverojn kontraŭ la genuojn de Valdo. Ili frapadis kaj plaŭdadis kaj saltadis kaj ... kaj tiam ... Tiam Valdo sentis sin forpuŝiĝi en la flakon. Li sentis siajn piedojn en la belaj novaj botoj rapide sinki en la malluman profundaĵon. Li sentis siajn genuojn ekkaptatajn de la akvo, tiam malsekiĝi unue sian ventron, sekve siajn pro timo baraktantajn brakojn kaj fine droniĝi sian kapon en la malpuran verdaĉan ŝlimflakon.

La unua penso kiu traflugis la cerbon de Valdo kiam la akvosurfaco sin fermis super lin estis ke li dronos. En la sama momento li ekaŭdis laŭtan plensonan tintadon kvazaŭ de multe da dispeciĝanta vitro. Timigite li malfermegis la okulojn kaj sin trovis kuŝanta en la flako, la vizaĝon suben. Konfuzita kaj hontanta li stariĝis kaj tuj sin demandis ĉu iu estus vidinta lin fali. Sed la strato montriĝis tute senviva. Lia librosako kuŝis ankoraŭ apud la flako, kie li estis lasinta ĝin. Li ankoraŭ portis siajn botojn. Sed li jen malseka, malvarma kaj malpura, malkuraĝis, maltrankviliĝis. Lia kapo sentiĝis kvazaŭ li manmarŝus aŭ pendiĝus inverse de arbo-branĉo. Stranga afero kaj ege malagrabla. Ĝi estis malalloga flako.

Valdo kaptis sian sakon kaj viŝis la akverojn el siaj okuloj. Ne eĉ unufoje postenrigardinte, li forkuris.

2. Ĉio aliigita

Valdo haltis. Li sulkegigis la frunton kaj ĉirkaŭrigardis atente. "Jen diable!" li miregita diris al si, "Mi eble ararvagas. Tio ne estas la vojo al la lernejo". Li sin turnis kaj vidis la grizan straton kiun li ĵus trakuris. Ĝi estis malgaja strato kies malbelaj stultaspektaj domoj frontlinigitaj ambaŭflanke de ĝi indifere-nte apogis unu la alian. Laŭe iu estis plantinta iam magrajn arbojn, ligante ilin al dikegaj bastonoj, kvazaŭ el timo ke ili forkurus. Tio nur aspektigis la straton ankoraŭ pli morna. Valdo eksentis frostotremon. Li ekreeniris malrapide kaj dube. Liaj botoj interne trempiĝis ĉe ĉiu paŝo. Li miris ke li estis erarinta pri la vojo. Tio neniam antaŭe okazis al li. "Kompreneble tio okazis nur tial ke mi cerbumadis pri tiu flako", li trankviligis sin. "Probable mi estis iom distrita." En la sama momento Valdo rimarkis ke li atingis flankan straton. Transe lin atendis Petro, lia plej fida amiko. Li estis ruĝhara kaj havis gajan ruĝan vizaĝon. Lia sidloko apud Valdo en la klasejo estis benko ĉe la fenestro, kie la instruisto povis bone ilin observi. Li plue loĝis ne malproksime de ĉe Valdo. Kelkfoje ili aliris kune la lernejon.

"Petro!" ekkriis Valdo.

"Ha, Valdo!" reis Petro. Li miregite alrigardis Valdona kurete trapaŝantan la straton. "De kie diable ci do elvenas?" li demandis sciavide. "Kaj kio okazis? Ĉu batalo?" Valdo kapneis.

"Kio do?"

"Mi falis."

"Kie?"

"En flakon."

"Ĉu iu cin enpuŝis?"

"Neniu" respondis Valdo ruĝiĝante. Li ne tre kuraĝis diri ke li estis piedfrapadinta la flakojn por plezuro. Tion Petro juĝus infaneca. Sed Petro feliĉe ne plu demandis.